

Protokolo de la asembleo kaj la komitatkunsido okazigitaj je 24.07.2009 ekde 15.00h en Krakovo.

Decidoj: La komitato...

- Re-akceptis la intertempe detaligitajn ligajn celojn por la periodo 2009-2012
- Akceptis la indikan buĝeton por la jaro 2010
- Decidis ke la baza membro-kotizo restos senŝanĝa por 2010 (sen voĉdono)
- Akceptis ke la reta abono por 2010 estu 4 EUR por B-landoj kaj 8 EUR por A-landoj.
- Konsentis pri la starigo de nova komisiono pri universitata kaj scienca agado, sub gvido de Duncan Charters kun fondo-membroj Radojica Petrović, Ilona Koutny, Aida Čižikaitė kaj Kristin Tytgat, kun la rajto aldoni novajn membrojn kaj arigi kunlaborantojn.
- Decidis ke la lernejan komisionon gvidos Julián Hernandez, kun aldono de membroj Maria Jerković kaj Jacqueline Poux.
- Konsentis ke la elekto-komisiono plue oficu unu plian jaron, kaj estonte estu rekonsistigita unu jaron post la estraraj elektoj.

Protokolo:

La asembleon malfermis la nova prezidanto, kun ripeto de la jam esprimitaj dankoj al la malnova estraro. Li poste prezentis la novan estraron kaj la taskdividon.

Resumon de la konferenca programo prezentis Aida Čižikaitė: prelegoj, simpozio, ekskursoj, renkontiĝo de universitataj instruistoj (kun aldono de I. Koutny)

Proponoj kaj rekomendoj rilate al konferenco estis la sekvaj:

Trifoi: prefere ekskursoj dum unu tago.

Smits: estu ejo por kunveni, babilo; eviti paralelecon kun aliaj konferencoj, kongresoj

Keefe: almenaŭ unu komuna kunveno ĉiutage por ĉiuj konferencanoj por pli bone komuniki informojn.

Charters: taksfolio estus bona por prijuĝi organizadon, bonojn, malbonojn

Casquero: malĝoja pri la multaj ekskursoj, vane la bonaj prelegoj, se konferencanoj estas for ekskursi, amuziĝi

Prezento de ĉefaj celoj de ILEI 2009-2012 (disdonita papere, projekciata surmure)

La prezidanto prezentis ĉiujn punktojn (vidu IPR 2009/3 kaj en la hejmpaĝo sub „novaĵoj”), kun sekvaj komentoj:

Keefe: magistras, profesiaj trejnkursoj profesie zorgas pri instruista trejnado: RSA, Celta, TESOL, 1-monataj kursoj por instrukapabligo

Koutny: graveco de terminologia agado; specialaĵojn pri Esperanto-instruado ne povas plenumi eksteraj trejnistoj

Petrović: informkampanjoj por kursoj, informmaterialoj pri Esperanto, ILEI: broŝuro Malkovru Esperanton. Alvoko: landaj sekcioj prizorgu nacilingvajn tradukojn (Japanio jam decidis fari) kaj proponu subvencipeton de ILEI

Charters: 4-semajnaj kursoj pro instruista trejnado, retkursoj povos helpi instrukapabligon, gravas ankaŭ allogi studentojn al UAM

MacGill: ni klopodu instituciigi instruistan trejnadon laŭ la iama instigo de prof. Szerdahelyi

Casquero: estas multaj amatoraj instruemuloj, ne eblas malhelpi ilin, tamen ni pli bone trejnu ilin

Korody: ni devas danki al ili sed ni devas ankaŭ zorgi, ke nia trejnoferto estu egalrajta kun aliaj fremdaj lingvoj kaj atingu renomon

MacGill: atentigas pri la rolo de la aktualigita kaj reeldonita Manlibro pri instruado por altigi la kapablon de izolitaj aŭ neprofesiaj kursgvidantoj, kaj reliefigas la utilon de la revuo *Juna amiko* por riĉigi kursojn.

Charters: Mencias la katedro-projekton de <edukado.net> kaj la ebloj uzi DVD-filmetojn por prezenti instru-metodojn.

Je ĉi tiu punkto, la komitato estas kunvokita, kun 26 membroj, do la kvorumo estas atingita.

La detaligitaj ĉefaj celoj 2009-2010 estas akceptitaj unuanime.

La indika buĝeto por 2010 estis disdonita papere kaj projekciata surmure. (vidu ĝin en la hejmpaĝo). Fontannaz demandas kial estas tiom pli alta sumo ĉe subvenciaj enspezoj por 2010 kompare al 2009. MacGill klarigas kiel la subvenciaj enspezoj estas kontraŭpezigitaj per pli da elspezoj por la realigo de agado per projektoj, kaj tio simile kreskas inter 2009 kaj 2010.

Kadre de la buĝeta diskuto, la estraro sekvas la pli frue esprimitan opinion de la komitato kaj tenas la plenajn ligajn kotizojn je la sama nivelo. Ĝi tamen proponas altigi la retan membrotizon: B-lando 4 EUR, A-lando 8 EUR (26 voĉoj, unuanime akceptita).

Pri la sekva konferenco Bosga emfazas ke UEA, TEJO kaj ILEI devas kunordigi la organizadon de tri aranĝoj, IJK, UK kaj ILEI-konferenco, tiel ke 3-semajna restado en Kubo eblu. Montesinos esprimas pretecon helpi organizi la konferencon en 2010.

La indika buĝeto estas akceptita unuanime.

MacGill proponas la starigon de komisiono pri la universitata kaj scienca agado: la gvidanto estu Charters, kun fondo-membroj Petrović, Čížikaitė, Koutny kaj Tytgat, kun la rajto aldoni pliajn. Akceptite unuanime.

La komisiono pri lerneja agado estos gvidata de Hernandez, kun la aldono de Maria Jerković (HR) kaj Jaqueline Poux (voĉdono 24 por, 2 sindetenoj)

Aldoniĝas danko al la elekta komisiono: Tiekō Isikawa, Ana Montesinos kaj Aurora Bute. Ilia mandato estas longigita je unu jaro, tiel ke estonte la elekto-komisiono ne estu reelektita samjare kun la estraro, sed en la posta jaro.

La nova estraro vidas la gravecon publikigi pri da novaĵoj, raportoj kaj dokumentoj en la ILEI-
hejmpaĝo, cele al pli efika informfluo. Inter la planoj estas starigo de hejmpaĝo surbaze de novaj
teknologiaj ebloj.

Alvoko estas farita por kontribuaĵoj por IPR: konferencaj prelegoj kaj fotoj.

Oni skizas la ILEI-planojn dum UK: budo, TdL, propra faka kunsido, movada forumo.

Tytgat parolas pri universitata agado, kunlaboro per projektoj kaj subvenciaj ebloj.

La kunlaboro kun AIS dum la konferenco estas reliefigita, kun transdono de AIS atestiloj pri kurs-
partopreno.

La nova prezidanto fermas la asembleon skizante la diversajn eblojn por konferencintoj kaj membroj
resti aktivaj dum la jaro:

- Vizitadu hejmpaĝojn kiel www.ilei.info, www.edukado.net, www.lernu.net, kaj tiujn de niaj
sekcioj; lasu komentojn, kontribuu materialojn; aktivu diskutliste.
- Partoprenu sekciajn kaj aliajn eduk-rilatajn aranĝojn – aŭ organizu proprajn!
- Uzu la reeldonitan manlibron por akiri utilajn konsilojn por viaj kursoj.
- Plusendu ILEI-komunikojn kaj prezentu la ligojn en naciaj kongresoj, regionaj kaj lokaj kluboj,
en junularaj aranĝoj kaj en konvenaj ekstermovadaj forumoj.
- Aliĝu al la 43a konferenco en Matanzas, Kubo, kaj rekomendu ĝin al aliaj.
- Abonu la revuon *Juna amiko* kaj abonigu aliajn, precipe el kursoj kaj grupoj.
- Anoncu viajn kursojn internacie; ligu kursanojn internacie, gvidu ilin al ekzamenoj kaj la
esperanta vivo!
- Membriĝu en komisiono aŭ fariĝu kunlaboranto. Se vi ne trovas konvenan, proponu la
starigon de nova!

La asembleo estis per aplaŭdo finita. Paŭzeto estas anoncita ĝis la ferma ceremonio.

Protokolis: Nina Danilyuk, Mihai Trifoi.

Postredaktis: Stefan MacGill (Augusto 26, 2009)